In der Jahreshauptversammlung hob der Vorsitzende, Bernd Krause, die konstruktive Zusammenarbeit der Mitglieder der Vorstandschaft

hervor. Die Vorbereitungsarbeiten der Esperanto-Gruppe Nürnberg zu deren 125-jährigen Bestehen 2013 und die Ausrichtung des dort stattfindenden Deutschen Esperanto-Kongresses soll durch BELO auch finanziell unterstützt werden. In den vorgetragenen Jahresberichten von 9 bayerischen Esperanto-Gruppen stand das ständige Bemühen um mehr Interesse an der Esperanto-Bewegung im Vordergrund. Das Zamenhoffest 2011 wird am 17. Dezember in Nürnberg stattfinden; als Ort für die nächste BELO-Mitgliederversammlung sind München und Pfaffenhofen im Gespräch.

Der vor kurzem verstorbenen BELO-Mitglieder Hermann Schmid, Augsburg, und Ester Keil, Nürnberg, – beide waren den größten Teil ihres Lebens äußerst aktive Mitstreiter – wurde mit einer Würdigung und Schweigeminuten gedacht. Dr. Horst Denzer von der Europa Union, würdigte in einem weiteren Nachruf



Mitglieder des Esperanto-Sprachklubs Augsburg beim Liedvortrag, ganz links die Vorsitzende Steffi Tucker. Foto: Jomo Ipfelkofer

die vielen Verdienste von Hermann Schmid.

Die Mitglieder des Esperanto-Sprachklubs Augsburg sorgten für einen süßen Abschluss des offiziellen Teils des Ligatages mit Kaffee und selbstgebackenen Torten, die reißenden Absatz fanden.

Arbeitsgemeinschaft Kultusministerium tagte

Anschließend trafen sich die Mitglieder der „Arbeitsgemeinschaft Kultusministerium“ zu einem Erfahrungsaustausch. Zur Kommentierung im Rahmen ihrer jeweiligen Aufgabenbereiche erhielten sie je ein Exemplar der von Gerald und Stefanie Tucker erarbeiteten Materialien zur Umsetzung des Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmens für Sprachen, Stufen A1 und A2 (Esperanto). Dieses Material wird von Prof. Dr. Martin Haase, Universität Bamberg, begutachtet werden, der sich bereit erklärte, eine Erweiterung des bestehenden „Gelenks“ zwischen BELO und dem Bayerischen Staatsministerium für Unterricht und Kultus zum Staatsministerium für Wissenschaft zu erwirken. Nach Fertigstellung und fachlicher Korrektur soll das Material in den Sprachen Deutsch und Esperanto an diese Ministerien weitergegeben werden, um so ein offizielles Konzept vorzulegen, das als erweiterbares Basisdokument für den „Anfangsunterricht Esperanto“ dienen soll.

Auch Mitglieder des Deutschen Esperanto-Instituts trafen sich unter Leitung ihres Direktors, Prof. Dr. Haase, in Augsburg, um Stand und Zukunft dieser Einrichtung – mit besonderem Augenmerk auf die Deutsche Esperanto Bibliothek und das Prüfungswesen – zu erörtern. Über diese Sitzung wird noch gesondert berichtet werden. **Stefanie Tucker**

Einladung: Zamenhoffest der Bayerischen Esperanto-Liga 2011

Am 17.12.2011 wird in Nürnberg (Villa Leon, kleiner Festsaal) das diesjährige Zamenhoffest von BELO stattfinden.

Für das Programm ist ein Block zum Thema „Literatur“ vorgesehen, dabei soll es darum gehen, dass jeder Teilnehmer die Möglichkeit hat, seinen persönlichen Lieblingsautor vorzustellen und aus dessen Werk vorzutragen. Das kann ein Gedicht, eine Anekdote, ein Buch oder etwas Anderes aus dem Bereich Literatur sein.

Alle Interessenten sind herzlich willkommen, um Voranmeldung und/oder Gedanken zum Thema wird gebeten per E-Mail unter zamenhoffesto2011@esperanto-bayern.de, bei der Esperanto-Gruppe Nürnberg oder bei BELO (Kontaktformular auf www.esperanto-bayern.de). Genauere Informationen werden zu gegebener Zeit und auf Anfrage gern erteilt.

Esperanto Gruppe Nürnberg
Helmut Sebastian

Bayerische Esperanto-Liga
Bernd Krause

Mallonge...

Tiu ĉi rubriko donu interesajn novaĵojn (ĉu ĝojindajn, ĉu plorindajn) en unu-du frazoj sen plia komento.

● La 14an de aprilo 2011 redaktisto de Berliner Zeitung mokis Esperanton per rimarko: „la internacia mikslingvo, kiun neniu parolas“. www.presseurop.eu/de/content/article/607081-aufmarsch-der-eurogegner.

● La 17an de majo 2011 la radiostacio Bayern2 memorigis pri la malpermeso de Esperanto en Germanaj lernejoj je la 17a de majo 1935. Aldoniĝis kelkaj pozitivaj informoj pri Esperanto. Laŭ informo de Karl Breuninger

● La nova estraro de Pola Esperanto-Asocio oficiale akceptis la inviton al Komuna Esperanto-Kongreso 2012 en Berlin.

● La 1an de aprilo Brian Barker lanĉis ŝercan mesaĝon, ke Eŭropa Unio

transiris al Esperanto pro financaj kaŭzoj. Pluraj gazetoj kredis tion kaj alvokis lin. www.esperokatolika.org/eu/europo.htm

● En 2012 Dennis Keefe, kiu instruas Esperanton en Ĉinujo, volas lanĉi projekton „Esperanto-insulo“. Sur la insulo Hai Nan Dao proksime al Hongkongo Ĉinoj studu ankaŭ fakursojn en Esperanto. Universitataj docentoj en la tuta mondo ofertu virtualajn kursojn. Dennis Keefe, Universitato de Nankino, keefeinchina@gmail.com

● Esperantista Grupo de Sankta Rita (Demokratia Respubliko Kongo) fondis Feminisman Esperanto-Grupon, kiun estras f-ino Rachel Mafuluko. Komunikis Alexandrine Omba el DRKongo, alexandrine.ombas7@gmail.com.

ATTAC und das Sprachenproblem Beachtliches Interesse an Esperanto bei der Europäischen Sommerakademie ENA in Freiburg

Im Rahmen der Sommerakademie ENA („European Network Academy for Social Movements“) der globalisierungskritischen Bewegung ATTAC fand vom 10.-13. August in Freiburg ein Esperantokurs statt. Der Kurs kam zustande auf Einladung der Organisatoren der Akademie. Die Esperantogruppe Freiburg und der Esperanto-Landesverband Baden-Württemberg (BAVELO) führten den Kurs durch. Obwohl viele spannende Parallelangebote lockten, entschieden sich 20 Akademiebesucher für die Teilnahme an dem Esperantokurs.

Von den 1300 Teilnehmern der Sommerakademie waren die Hälfte Deutsche, ein Drittel Franzosen, und der Rest verteilte sich auf viele andere Nationen. Gedolmetscht wurde in den Arbeitsgruppen zwischen den drei Sprachen Französisch, Deutsch und Englisch. Englische Muttersprachler gab es fast keine.

Große Aufgeschlossenheit für Esperanto zeigte sich in einer Arbeitsgruppe, die sich an zwei Vormittagen mit Sprache als Mittel der Manipulation beschäftigte. In ihr wurde deutlich, dass Englisch im heutigen politischen und wirtschaftlichen System zu einem Herrschaftsinstrument der Mächtigen geworden ist, das einer demokratischen Korrektur bedürfte.

Eine ähnliche Verteilung der Sprachen wie unter den Gesamtteilnehmern fand sich auch im Esperantokurs. Außer Deutschen und Franzosen waren Spanien, Belgien, Schweden, Österreich und Russland in dem Kurs vertreten, für den viermal 90 Minuten vorgesehen waren. Die Kursleiter Alois Eder und Ursula Niesert entschieden sich für die direkte Methode. Am Ende der vier

Abende konnten die Teilnehmer einem Text in leichtem Esperanto folgen, in dem es um die politischen Themen ging, die in der ATTAC-Akademie diskutiert wurden. Und dies, obwohl nur knapp die Hälfte der Zeit für den eigentlichen Esperantokurs, die andere Hälfte für Informationen rund um Esperanto verwendet wurde.

Ursula Niesert, Freiburg, erklärte in leichtem Esperanto die Chancen von Wikipedia für Esperanto, Manfred Westermayer, Gundelfingen, legte auf Deutsch den Zusammenhang von Esperanto und politischem Engagement dar, und Cyrille Hurstel von der Esperantogruppe Straßburg erläuterte auf Französisch in einer Bildpräsentation Esperanto im Zusammenhang der Sprachenpolitik.

Von den beiden zur Verfügung gestellten Dolmetscherinnen konnte die Kursleitung vorneweg auf die zweite verzichten, zugunsten anderer Arbeitsgruppen. Und auch die eine hatte nur zeitweise zu tun; die „freie Zeit“ nutzte sie dafür, Esperanto mitzulernen.

Alois Eder

Tradicie tendumi ĉe trankvila lago

De la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 2011 okazis la 33a Somera Esperanto-Familia/-Feria Tendaro (SEFT) en Thomsdorf. Partoprenis 89 gastoj (kun infanoj) el Germanujo, Skotlando, Ukrainujo, Nederlando kaj Svislando. La organizantoj skribas:

Nia slogano estas: „Nur okazas tio, kion vi aranĝas por la aliaj.“ Ĉiu vivas laŭ propra volo, sed okazas ĉiutage iuj komunaj aferoj: manĝoj, fabelhoroj, migradoj, prelegetoj. Se vi havas bonajn okulojn, tiam vi eble vidos Esperanto-signojn. Atentu:

En 2012 la 34a SEFT okazos 21a ĝis 29a de julio 2012, brilos la suno.

Verner Pfennig

http://www.esperanto-nb.de/seft/seft_de.html



Foto: Werner Pfennig

Muzik-grupo „Jesperanto“

Mi legis anoncon en la Lippische Landeszeitung pri koncerto en Blomberg-Reelkirchen. La nomo de la grupo „Jesperanto“, miksvorto el „Jazz“ kaj „Esperanto“, ege interesis min. Mi informis aliajn esperantistojn en la regiono kaj ni veturis al Blomberg. Ĉeestis sufiĉe multaj homoj, estis bona etoso. La muziko ne tre plaĉis al mi, sed al aliaj homoj (junaj kaj mezaĝaj) kiuj ofte freneze aplaudis. La grupo venis el la regiono Bielefeld-Osnabrück-Oldenburg (4 viroj plus speciala gasto) kaj estis ege simpatia.



Dum la paŭzo mi alparolis la estron rilate al nomo de la grupo. Li diris ke li konatiĝis kun Esperanto en la gepatra domo, poste ne plu daŭrigis, sed elektis la nomon por la grupo, ĉar same kiel la internacia lingvo la muziko kunigas homojn.

Antaŭ la lasta muzikaĵo li klarigis la nomon al la aŭskultantaro kaj laŭdege parolis pri „la bela lingvo

Esperanto“. Do, post la fino de la koncerto mi disdonis al la muzikistoj (kaj aliaj personoj) la novan bone faritan broŝuron de ILEI, kaj mian telefonnumeron al s-ro Baumgärtner, la estro de la grupo. Li havas emon revivigi kontaktojn al Esperantujo kaj bedaŭras ke mankas kantist(in)o en la grupo, kiu scipovus kanti en Esperanto.

Karin Klose

Ĉefurbestro vizitis la Esperanto-standon



Ĉef-urbestro Horst Frank (3a de maldekstre) kun edzino antaŭ la informstando de grupo Konstanz.

La 15-an de majo la Esperanto-grupo de Konstanz prezentis en la Svisa-Germana metiista ekspozicio GEWA grandan informstandon pri Esperanto kun granda gamo de literaturo, lernolibroj, poŝtmarkoj, varbiloj ktp. Inter la vizitantoj estis d-ro Michael Schmidt, iama Esperanto-motora en Konstanz, kaj la ĉef-urbestro Horst Frank.

Laŭ informoj de Traudel Bengsch

Antaŭ 100 jaroj Zamenhof vizitis kun sia edzino Bad Kissingen. Esperanto-Societo Frankfurt/M. rememorigis pri tiu okazintaĵo

La 12an de julio 1911 venis d-ro Zamenhof kun sia edzino al la kurac-urbo Bad Kissingen. Ili loĝis en Bismarckstraße 22. Apuda malgranda parko ĉe la angulo de stratoj nomiĝas ekde 1991 Esperanto-placo. Sur la domo troviĝas tabulo iniciita de Hugo Röllinger, tre aktiva Esperantisto el Bad Kissingen. Li ne plu vivas kaj bedaŭrinde lia vidvino pro malsano ankaŭ ne povis viziti nian standon .

Esperanto-Societo Frankfurt (ESF) uzis sian jaran ekskurson por rememorigi la viziton de la geedzoj Zamenhof. Membroj de la societo, plifortigitaj de du gastoj el Forchheim, faris informstandon sub la tabulo Esperanto-placo. Ili montris la larĝan amplekson de Esperanto kaj ĝian evoluon per vortaroj el diversaj jaroj, plie originalajn verkojn (de *Antologio de la Esperanto-poezio* ĝis *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*) kiel ankaŭ tradukojn el diversaj lingvoj, fine ne nur antologiojn de diversaj popoloj, sed ankaŭ tradukojn de konataj klasikaj verkoj de la mondliteraturo ĝis *La Dia Komedio* de Dante.

Je la nomo de la urbo la grupon salutis la dua urbestro, prof. d-ro Peter Deeg, kiu montris viglan intereson por Esperanto, ĉar ĝi ligas homojn kaj kulturojn. Li ricevis donace libron kaj gustumis la vinon Esperanto el Edenkoblen. Por li ekzistas ankaŭ privata ligo al la domo, en kiu loĝis Zamenhof – ĝi apartenis al la familio de lia praonklo.

Interesataj vizitantoj ricevis prospektojn kaj klarigojn pri la lingvo. Iuj el ili deziris aĉeti librojn. Ni povis helpi al ili



nur donante adreson de la libroservo. Ĵurnalisto de Main-Post parolis kun ni kaj raportis pri la informstando en la ĵurnalo.

Katarina Eckstädt, Walter Ullmann

Hamburgo funebras pro Elsbeth Wielgus



La 3an de aŭgusto 2011 mortis en Hamburgo sinjorino Elsbeth Wielgus, 82 jara. Esperanton ŝi eklernis en 1948 en kurso de August Weide, kune kun sia posta edzo Heinrich Wielgus, kiu mortis en oktobro 2009. Dum pli ol 60 jaroj ŝi estis membro de Germana Esperanto-Asocio. En Hamburga Esperanto-Societo (HES) ŝi multajn jarojn estis prezidanto, kuiristo, dommastrino kaj la „patrino de la klubo“. En 2004 ŝi fariĝis honora membro de HES. En la nekrologo skribas la Hamburganoj: „Por multaj el niaj membroj ŝi estis bona amikino. Al ni mankos ŝia varmkora personeco kaj ni tenos ŝin en niaj memoroj.“

Laŭ nekrologo en „*Esperanto Hamburg*“, 2011/4



Mit ihrer 4. Konferenz vom 30. Juli bis zum 6. August 2011 feierte die Internacia Naturkuraca Asocio (Internationale Gesellschaft für Naturheilkunde) ihr 25-jähriges Bestehen in Herzberg am Harz - der Esperanto-Stadt. Die Presse berichtete in drei großen und mehreren kleinen Beiträgen.

25 Jahre sind nicht sehr viel für einen Verein. Vielleicht gerade deshalb bemühen wir uns sehr um die Einbeziehung von Nicht-Esperanto-Sprechern. Ein Tag stand im Zeichen der Biene, deren Produkte im besten Sinne naturheilkundlich sind. Dafür wurden Kontakte zu den örtlichen Imkern geknüpft, die hervorragend lernen konnten, dass man auch in Esperanto sehr gut über dieses Thema sprechen kann.

Mit unserem chinesischen Mitglied, Dr. Wang Disheng, Chefarzt für Traditionelle Chinesische Medizin am Krankenhaus von Anhui, haben wir das Krankenhaus in Herzberg besucht. Dort war man sehr erfreut über den fernen Gast und hat viele Erfahrungen ausgetauscht. Künftige Veranstaltungen von INA könnten dort im Krankenhaus stattfinden.

Der Konferenz schloss sich ein Seminar für Fachleute an, in Esperanto für Nicht-Esperanto-Sprecher. Dr. Puramo Chong referierte in Esperanto über die Konstitutionelle Koreanische Medizin und Sa-am Akupunktur vor Heilpraktikern und Ärzten aus Belgien, Österreich, der Schweiz, Litauen und Deutschland. Übersetzt wurde von Heilpraktiker Harald Schicke. Am 3. Tag war eine Übersetzung kaum noch nötig. Die zwanzig Teilnehmer waren sehr angetan von der Idee des Esperanto und seinen Möglichkeiten. Einige kommen wieder in die Esperanto-Stadt, um in der Volkshochschule am Esperanto-Bildungsurlaub teilzunehmen, den das Esperanto-Centro organisiert (5.-9.03.2012). Die meisten werden zum Folgeseminar im Januar 2012 kommen, das natürlich auch wieder in Esperanto stattfinden wird.

Harald Schicke, Vorsitzender von INA

Pri la kvakeroj en 15 lingvoj

La kvakera movado ekestis en Anglio, kaj pro tio la modernaj eŭropaj kvakeroj multe uzas la anglan internacie.

Tial estas ĝojige, ke nova Interreta kurso, kiu prezentas kvakerismon al novuloj, aperas en 15 lingvoj kaj ke inter tiuj estas Esperanto.

Kvakerismo estas sendogma religio bazita sur silentaj kunvenoj kaj kun radikoj en la kristanismo de la 17a jarcento. La kurso celas informi interesatojn pri la kvakeraj praktiko kaj tradicioj per interdiskutoj ĉirkaŭ klasikaj kaj klarigaj tekstoj.

Kvakera Esperanto-Societo noos.ch/kes

<http://www.noos.ch/kes/>

http://www.noos.ch/kes/eo/novajoj_eo.php

Halina Gorecka sukcese operaciita en Moskvo

Halina Gorecka, la eldonanto de *La Ondo de Esperanto* estas sukcese operaciita en Moskvo. La greftita reno bone ekfunkciis.



La atendado, komencita fine de la pasintjara aŭgusto ne finiĝus sukcese, se ni ne ricevus grandan subtenon de la esperantistaro, kiu ebligis al Halina kaj ŝia familio transvivi la tre komplikitan vivoperiodon. Nun ŝi jam memstare promenas, kaj, se ne okazos subitaj problemoj, fine de oktobro ŝi kun sia edzo revenos el Moskvo al Kaliningrado, kie ili rekomencos sian laboron por la bono de la tuta esperantista komunumo.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj subtenis finance, al ĉiuj, kiuj bondeziris, al ĉiuj, kiuj preĝis por Halina!

Laŭ informo de *La Ondo de Esperanto*

2a Grandpolia Esperanta Somero (GES)

De la 25-a ĝis la 29-a de junio 2011, en la pitoreske situanta pola urbo Wągrowiec okazis la kultur-politika Esperanto-aranĝo „La 2a Grandpolia Esperanta Somero” (GES-2), en kiu krom polaj esperantistoj partoprenis ankaŭ gastoj el Germanio, Hungario, Italio, Serbio kaj Ĉinio

Dum la unua tago la aranĝon honorigis per sia ĉeesto parlamentano de la Pola Sejmo – Tadeusz Tomaszewski, kiu alportis kaj voĉlegis specialan salutleteron de vicprezidanto de la Pola Sejmo – Jerzy Wenderlich, la Alta Protektanto de GES-2, al kiu oficaĵ devoj malebligis personan ĉeeston dum la aranĝo.

Dum la diskutado, la parlamentano Tomaszewski sugestis al ni, ke eblas kaj valoras krei en la Pola Sejmo Parlamentanan Klubon de E-amikoj kiu per sia agado helpas en disvastigo de la ideo kaj lingvo Esperanto en la Pola



Sejmo kaj Pollando kaj havus konstantan kontakton kaj kunlaboron kun i.a. EDE-PL. Parlamentano Tomaszewski promesis, ke post la aŭtunaj novaj balotoj por la Pola Parlamento, se li denove estos parlamentano, ni povas certe kalkuli je lia helpo kaj li povus gvidi la Parlamentanan Klubon de


E-amikoj. Kun germanaj kaj hungaraj reprezentantoj de Eŭropa Federacio EDE ni diskutis pri eblecoj de nia agado sur la eŭropa politika scenejo kaj pri eblecoj de disvastigo de Esperanto en Eŭropo kiel duoficiala lingvo apud la 23 oficialaj lingvoj de EU.

Pola Sekcio de EDE formiĝis plejparte de membroj de t.n. Iniciata Grupo „Esperanto por EU”. S-ro Kazimiro Krzyzak priparolis do la plej gravajn sukcesojn de tiu ĉi grupo kaj oficiale la grupon likvidis, por ke ĉiujn taskojn transprenu la jam pli multaj membroj de EDE-PL. Fine, ĉiuj aktivaj membroj de antaŭa Iniciata Grupo ricevis pro sia agado bele faritajn „dankesprimojn” kaj s-roj Krzyzak kaj Witucki ankaŭ simbolajn distingojn.

Laŭ raporto de Antoni Beyga

Ĉu Esperantaj lingvoatestiloj estos konsiderataj en la Universitato de Varsovio?

La Studenta Parlamento de la Universitato de Varsovio en ĝenerala voĉdonado merkrede, la 22-an de junio 2011, akceptis rezolucion, en kiu ĝi subtenas la proponon de Pola Esperanto-Asocio pri rekonado de Esperanto egale kun aliaj lingvoj fare de la Rektorino de la Universitato.



Pola Esperanto-Asocio (PEA) proponas al la rektorino de la universitato de Varsovio enskribi la Esperantajn ekzamenojn laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la budapeŝta universitato ELTE-ITK en la liston de la lingvoekzamenoj konsiderataj de la universitato.

Ĉiu studento antaŭ bakalaŭriĝo devas pruvi sian konon de iu fremda lingvo minimume je la nivelo B2. Kelkaj fakoj – kiel fizika fako – limigis, ke oni devas pruvi lingvokonon de la angla lingvo, sed ĝenerale studento povas ekzameniĝi en la universitato pri libere elektita lingvo instruata en la universitato, aŭ li devas doni lingvoatestilon de alia instanco, sed nur de la listo de instancoj, lingvoj kaj lingvoatestiloj difinitaj de la rektorino. PEA volas, ke tiu listo estu pligrandigita je la budapeŝtaj KER-ekzamenoj pri Esperanto.

Pawel Fischer-Kotowski,
ĝenerala sekretario de PEA
pawel.fischer-kotowski@pej.pl

Esperanto en Burundo/Afriko

La nacia asocio de Burundo ANEB estis tre aktiva kaj sukcesplena dum la lastaj jaroj. En aŭgusto 2008 ses instruistoj iris al foraj regionoj de la lando por unusemajna seminarieto, je kiu preskaŭ 100 personoj lernis Esperanton. En 2009 venis instrui Johan Derks kaj Svetlana Milanovic el Nederlando. En tiu jaro la nombro de kluboj kreskis al 37. En julio 2010 okazis la dua nacia kongreso; okazis en aŭgusto sukcesa seminario en la provinco Bubanza kun partopreno de esperantistoj el Ugando kaj Kenjo.

Lastjare la instrusekcio organizis kursojn kaj renkontiĝojn en diversaj regionoj de Burundo. La junulara sekcio estis akceptita de ILEI dum la Krakova konferenco. Ankaŭ ekzistas sporta sekcio, kun piedpilka teamo, kiu partoprenas en loka turniro. Stariĝis ankaŭ skolta sekcio.

En pasinta aprilo venis Mireille Grosjean el Svisujo. Ŝi instruis dum kvin tagoj kaj ekzamenis 14 partoprenantojn laŭ la meza nivelo (12 sukcesis) kaj 17 laŭ la elementa nivelo (13 sukcesis).

En novembro 2010 ANEB aĉetis terenon de 425 m², kie ĝi konstruos bibliotekon. La fondaĵo „Esperanto en Evoluo“ lanĉis rimarkindan kampanjon por kolekti ok mil eŭrojn favore al konstruado de la biblioteko en la setlejo Rumonge, Burundo, ĉe la lago Tanganjiko.

Oni inventis metodon de 'valorcertigilo' por helpi finance la junajn esperantistojn en Burundo. Tiu subskribita papero simbolas la pruntedonon de monsumo de minimume 50 eŭroj. La sumo restos dum minimume tri jaroj en la fonduso por konstrui la bibliotekon. Post tiu periodo la pruntedoninto rajtas repostulian monon.

Esperanta biblioteko estas esenca por la junaj esperantistoj, ĉar imagu: Se jam ili trovis monon aŭ afablan eŭropanon por ekhavi lernolibron, tiu estos baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj. En iliaj domoj mankas ŝrankoj kaj kutime eĉ litkadroj, tiom malriĉaj ili estas. En la Esperanto-centro povos esti gardataj Esperanto-libroj kiel komuna posedaĵo, estos komputilo kun ret-aliro kaj la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi.



„Esperanto en Evoluo“ havas propran retejon (<http://esp-evoluo.tk>) kaj konton ĉe UEA kun la kodo eeer-u. Simple ĝiru la deziratan sumon al unu el la kontoj de UEA kun mencio de la kodo eeer-u, 'valorcertigilo' kaj via adreso.

Johan Derks

La GEA-prezidanton atingis jena letero el Burundo:

Tre estimataj gesinjoroj, tutkore mi salutas vin! ...

Jam kelke da jaroj, Afrika Esperantista Instituto serĉas kunlabori kun gravaj personoj kiel vi, tamen ni sukcesas kontakti vin kadre de instruado de nia mirinda lingvo esperanto.

Afrika Esperantista Instituto prizorgas diversajn kategoriojn de la bazo ĝis universitato kun diversaj fakoj.

Ni ankaŭ aŭdis, ke en via lando la instruado de esperanto tre bone evoluas kaj ni tute ĝojas pri tio, do se eblas dezirus starigi partnerecon inter la lernejoj el via lando kun nia Instituto, ĉar en Esperantujo ni tute laboras kiel senlimaj kaj novaj popoloj kun komuna destino.

Atendante vian respondon, ni antaŭdankas vin. Amike kaj pace

Frederiko Nimubona, Responsulo
de Afrika Esperantista Instituto
Bujumburo-Burundo
Afrika Esperantio <aesperantio@yahoo.fi>; Tel +257 77 044 717

*(Se iu vidas eblon kunlabori,
tiu respondu rekte.)*



En pasinta aprilo venis al Burundo Mireille Grosjean el Svisujo.

Instrui, dokumenti, organizi: Vasta agado planlingva Claude Gacond 80-jara

Multjaraj amikeco kaj kunlaboro ligas nian bibliotekon kaj ĝiajn Alenajn laborantojn al Claude Gacond kaj lia vivoverko, la lingva esplorcentro CDELI en La Chaux-de-Fonds. Li estis la unua premiito de la Esperanto-Kulturpremio de la fondaĵo FAME kaj tial en 1991 vizitis Aalen.

Por ekspozicio li kunportis la antikvan skribmaŝinon de Edmond Privat, kiun poste ni devis retransporti al CDELI. Tio donis okazon bone konatiĝi kun li kaj lia agado en la Kultura Centro Esperantista (kiu tiutempe konsistis el 7 domoj) kaj

la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (fako de la Urba Biblioteko).

Do ni ne povis ne ĉeesti lian jubileon de 80-a naskiĝ-datreveno, kiun ornamis omaĝo de lia vivoverko kaj transdono de festlibro *Instrui, dokumenti, organizi* kaj sekvis postfesta renkonto en apuda vilaĝeto. Okazis multe da paroladoj, artaj prezentoj, babilado, renovigo de amikeco.

La estimon de ĉiuj al la jubileanto pravas listo abunda de aktivaj kaj pasivaj ĉeestantoj: la direktoro de la urba biblioteko Jacques-André Humair, la UEA-prezidanto Probal Dasgupta, la estraranoj de la Svisa Esperanto-Societo (Mireille Grosjean, Dietrich Michael Weidmann, Stefano Keller), Katalin Kováts, Ilona Koutny, István Ertl, Georgo Handzlik, Renato

Corsetti kun Anna Löwenstein, Claude Nourmont kun Brian Moon – kaj la multaj aliaj, bv. pardoni mian forgesemon!

Ke CDELI traktas planlingvojn ĝenerale, montras la inicialoj de la festlibro: *Instrui, dokumenti, organizi* formas la vorton Ido. Claude neniam konis ian kontaktfobion al adeptoj de aliaj planlingvoj, kaj CDELI ja estas hejmo ankaŭ por Idistoj; multjara kunlaboranto de Claude estis ano de Occidental kaj la reprezentantoj de Interlingua riverencas lin pro lia praktikata plan-lingva ekumenismo.

Pritaksi kaj recenzi la festlibron mi lasas al interlingvistoj, kiuj estas pli kompetentaj en la fako ol mi. Al la jubileanto ni ĉiuj deziras pliajn multajn jarojn, fruktodonajn kaj gajoplenajn en rondo de amikoj! **Utho Maier**



Parto de la gratulantaro kun multaj konataj vizaĝoj, inter ili la jubileulo Claude Gacond (la 7a de maldekstre)

Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke

„Interlinguistik und Esperantologie“ ist der Titel eines weiteren Buches, das in diesem Jahr erschien und im Zusammenhang mit dem 70. Geburtstag von Dr. Detlev Blanke steht. Der oben gewählte Titel für diese Besprechung sagt genauer, worum es geht: nämlich um eine Bibliographie der weit über 1.200 Veröffentlichungen des Jubilars, von ihm selbst zusammengestellt und von Ulrich Becker in dessen Verlag Mondial, New York, herausgegeben. Vorwort, Einführung, Biographie sowie Register und Abkürzungen sind sowohl in Deutsch als auch in Esperanto.

Die vorliegende Bibliographie kann jedem, der sich mit Interlinguistik beschäftigt, als Nachschlagewerk empfohlen werden. Die Veröffentlichungen sind in sieben Kapitel eingeteilt: Monographien, herausgegebene Sammelbände, gebundene Manuskripte, Übersetzungen, Redaktion von Periodika, Verschiedenes und Artikel, Rezensionen und Beiträge in Sammelbänden. Aufgenommen sind nicht nur wissenschaftliche Werke, sondern auch Manuskripte, die sich mit der Esperanto-Bewegung beschäftigen, bis hin zu Beiträgen in Esperanto-Zeitungen. Alles ist innerhalb der Kapitel chronologisch geordnet, wobei für jedes Erscheinungsjahr aber die wissenschaftlichen Beiträge von den übrigen getrennt wurden. Ein weiteres Kapitel des Buches führt Aufsätze über die Person Detlev Blanke auf. Dem schließen sich umfangreiche Register an: Aufgeführte Periodika, rezensierte Werke, ein Namensindex, eine Liste der erfassten Sprachen und natürlich ein Sachregister, ebenfalls in Deutsch und Esperanto. Wie schon bei jedem umfangreicheren Werk erhöhen solche Register den Nutzen einer Literatursammlung entscheidend. Allerdings hätte ich mir das Sachregister noch ausführlicher gewünscht, wenngleich ich weiß, welche enorme Zusatzarbeit das bedeutet.

Die gewählten Einteilungen scheinen sehr zweckmäßig zu sein und bewährten sich auch in der Praxis, als der Rezensent überprüfen wollte, ob denn sprachwissenschaftlich Wichtiges zu Plansprachen nur in Esperanto erschienen ist. Dass über Esperanto in erster Linie auf Esperanto geschrieben wird, ist so selbstverständlich, wie Germanisten normalerweise



auf Deutsch schreiben, ohne deshalb ihre „Neutralität als Forscher“ einzubüßen, wie Roland Schnell in der Rezension zu „Florilegium Interlinguisticum“ behauptete. Dann dürften ja auch Anglisten nicht auf Englisch publizieren, was noch niemand verlangt hat.

Trotzdem ist es auch wichtig, dass wissenschaftliche Werke zur Interlinguistik auch in häufiger gelesenen Sprachen erscheinen, vor allem in Englisch, wie etwa die Fachzeitschrift *Language Problems & Language Planning*. Ein Blick in das vorliegende Buch erweist sofort, dass Detlev Blanke (und z.B. auch Sabine Fiedler) nicht

vorgeworfen werden kann, im elfenbeinernen Esperantoturm zu verharren. Wer ein Sprachstudium absolviert hat, ist sicher auf eine internationale Handbuchserie über die Hauptgebiete eines jeden sprachlichen Systems gestoßen und wird dann z.B. im Band mit dem Thema Morphologie einen Beitrag von Detlev Blanke zur Morphologie einiger Plansprachen stoßen. Auch war „Florilegium Interlinguisticum“ keineswegs das erste Buch zu Plansprachen, das in dem bekannten Verlag Peter Lang erschienen ist. Die einfache Tatsache, dass die von Detlev Blanke gegründete und bis heute geleitete „Gesellschaft für Interlinguistik“ Deutsch verwendet und so im Laufe der Jahre eine Fülle deutschsprachiger wissenschaftlicher Beiträge zu Esperanto und anderen Plansprachen der Öffentlichkeit zugänglich machen konnte, widerlegt bereits das Vorurteil von den „verschworenen Zirkeln“.

Das Äußere der Bibliographie ist einfach, aber zweckmäßig, wie von Mondial gewohnt. Eine oberflächliche Durchsicht auf Satz- und Tippfehler blieb ergebnislos, das Manuskript ist offenbar sehr sorgfältig lektoriert worden. Herrn Detlev Blanke kann man an Hand dieses Buches zu seinem Lebenswerk herzlich gratulieren.

Rudolf Fischer

Becker, Ulrich (Herausgeber): *Interlingvistiko kaj Esperantologio*. Bibliografio de la publikaĵoj de DETLEV BLANKE. Kun dulingvaj enkondukoj kaj indeksoj. / *Interlinguistik und Esperantologie*. Bibliographie der Veröffentlichungen von DETLEV BLANKE. Mit Einführungen und Registern in Deutsch und Esperanto. Verlag Mondial, New York, 2011. 234 S. ISBN 978-1-59569-202-3. Format: 14 x 21,5 cm. Gewicht: 362 g.

Nachtrag zu der Rezension „Florilegium Interlinguisticum“ aus *Esperanto aktuell* 2011/4. S. 18, von **Roland Schnell**. Es wurde vergessen, den Namen des Rezensenten anzugeben. Die Redaktion bittet um Entschuldigung.

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenwertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 1

Wieso wählten wir nicht eine modernere Publikationsform, etwa einen *Newsletter* oder ein *Blog*? Abgesehen von diesen scheußlichen Unwörtern: aus Rücksicht darauf, dass offenbar viele der D.E.B.-Mitglieder (noch) keinen Zugang zum Netz haben oder ihn zu selten nutzen – die Zeitschrift aber „frei Haus“ erhalten.

Wir wollen informieren, unsere subjektive Meinung abgeben, unsere Standpunkte beleuchten. So wird weitgehend auf Angabe von Quellen und Nachweisen mittels Fußnoten verzichtet, was nicht heißt, dass der Leser unbelegbare Behauptungen findet oder alles nur irgendwo abgeschrieben wurde – Nachweise gern auf Anfrage!

Festschriften bündeln in der Regel wichtige Beiträge aktueller Autoren und Forscher und erscheinen oft aus Anlass runder Geburtstage. Solche Sammlungen sind uns immer Anlass zu fragen, ob wir uns solche – häufig schon aufgrund niedrigerer Auflage sehr teuren - Erwerbungen leisten sollen, wollen oder gar müssen.

Der nicht nur in Bibliothekskreisen bekannte Esperantist *Claude Gacond* aus La Chaux-de-Fonds feierte Ende August seinen 80. Geburtstag. Aufgrund persönlicher Verbundenheit mit Claude, der ja als einer der ersten FAME-Preisträger schon in Aalen war und uns immer wieder großzügig unterstützte, nahm auch

eine Delegation aus Aalen an seinem Festtag teil. Ein Bericht dazu folgt separat.

Seine Festschrift *Instrui, dokumenti, organizi* zu subscribieren oder zu erwerben, dazu wurden wir vom Verleger mehrfach gedrängt. Dies unterließen wir aber mit Bedacht; denn wir hoffen, doch noch das Exemplar eines der zu erwartenden Rezensenten als Geschenk erhalten zu können – traurig genug ist es ja, dass uns nicht einmal renommierte Esperanto-Verleger mit einem freiwilligen Pflichtexemplar bedenken.

Die einzige rühmliche Ausnahme: Wenn wir Ulrich Becker von Mondial um die jüngsten Neuerscheinungen bitten, so erhalten wir umgehend eine kostenfreie Lieferung – Hut ab und herzlichen Dank auf diesem Wege, angesichts enorm hoher Versandkosten aus USA!

Und wegen Detlev Blankes *Festschrift Florilegium Interlinguisticum*, über die *Esperanto aktuell* 2011/4 berichtete, müssen wir uns auch keine Sorgen machen: Als ich ihm unsere Glückwünsche zum Festtag sandte, hat er uns als altruistischer Menschen- und Bücherfreund sofort ein Gratisexemplar davon versprochen, das längst schon eingetroffen ist, zusammen mit der Bibliographie seiner Veröffentlichungen: *Interlingvistiko kaj Esperantologio!*

Überhaupt, auch sonst versorgt er uns regelmäßig mit vielem, das wir sonst teuer erwerben müssten –

auch eine Extraspende, für die er in Münster sammelte, kommt von ihm. Danke, Detlev!


Wir hoffen auf Nachahmer, auch „kleinere“ Spenden sind willkommen! Ein Hinweis dazu: Sachspenden sollten uns möglichst früh angekündigt werden; es wäre doch schade, wenn wir unseren Erwerbungssetat durch Einkäufe schmälern, die sich dann im Nachhinein als nicht erforderlich erweisen. So erhielten wir letztes Jahr „gerade noch rechtzeitig“ ein Exemplar des nicht gerade preiswerten Werkes von Andreas Künzli: *Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa*, als wir am Überlegen waren, ob wir das Buch nicht doch kaufen müssten. Danke, Ulrich Lins!

Wie einfach man uns spenden kann, darauf werden wir noch zurückkommen. Einstweilen genüge der Hinweis: kurz anfragen per Netzbrief, Telefon oder Postkarte! Es geht ganz einfach, und um Steuern zu sparen, hilft es obendrein auch noch ... **Utho Maier**

**51jara viro,
bibliotekisto, el Kubo,
serĉas korespondpartneron.
Skribu al Jorge Abreu, S.
Sánchez, 102, Cruces-57500,
Cuba
aŭ al lia amikino
mmgonzalez@ucf.edu.cu**

Ludoviko Mimoo mortis antaŭ 25 jaroj

Akurate antaŭ jarcentkvarono mortis la kataluno Luís Mimó Espinalt. Li estis klera kaj diligenta Esperantisto, kiu preskaŭ solece esploris la Zamenhofan kodon dum multaj jaroj. La kvintesencon de siaj ekkonoj li formulis jene: „Centjara tradicio ne sanktigas, nek sankcias eraron. Logiko estas la fundamento de la Fundamento de Esperanto.“



morto Ŝulco atentigadis pri la esploroj de Mimó, kies nomon li esperantigis al Ludoviko Mimoo Espinalto. Post la morto de Mimoo, preskaŭ neniu okupiĝis pri ties laboro, krom la adeptoj de la Analiza Skolo, kiuj precipe loĝas en Germanujo.

Bedaŭrinde nuntempe la verkoj de Mimó estas malfacile akireblaj. Tamen valoras ankaŭ aktuale la penon konsulti ilin, ĉar la verkisto sobre, klare kaj sisteme prezentas la lingvaĵon tia kia konceptis ĝin ties kreinto: rimedo pura, racia, senescepta, internacie komprenebla, plene taŭga por ĉiuj vivosferoj kaj evolukapabla por estontaj bezonoj. La dudekkvina datreveno de la morto povas stimuli novan okupiĝon.

Rössler Franz-Georg

Per saĝaj komparoj kaj konkludoj li solvis multajn problemojn, pri kiuj lingvistoj ĝis hodiaŭ pene cerbumas sen scio pri la giganta laboro, kiun jam plenumis Mimó. Li traktis interalie la vortfaradon, la refleksivon, la participojn, la proprajn nomojn, preskaŭ nenion preterlasante. Li aperigis la materialon en ampleksa manuskripto sub la titolo „Esperanto por la jaro du mil“. Fininte tiun laboregon, Mimó mortis subite pro infarkto de la miokardio. En lastaj leteroj li amare konstatis, ke la oficiala Esperantismo tute ignoras lin kaj lian verkadon.

Eĉ ne subtenis lin la propraj hejmlandoj. Estis Rikardo Ŝulco, honora membro de Germana Esperanto-Asocio kaj laŭreato de la fondaĵo FAME, kiu fine de la vivo de Mimó enkontaktiĝis kun li, ekkonis la valoron de tiu laborado kaj komencis disvastigi ties ideojn pri regula, senkaprica Esperanto. La supre menciita verko aperis presite en 1989 ĉe Esperanto-Centro Paderborna sub ties estro Hermano Bermano (Hermann Behrmann). Ĝis sia

Verkoj de Ludoviko Mimoo

Verkoj prilingvaj:

Perfekteco de la Esperantaj verboj; Barcelono 1961

Decidaj argumentoj; Barcelono 1963

Kompleta lernolibro de regula Esperanto; Sabadell 1973

Esperanto por la jaro du mil; Sabadell (s.j.)

Kompleta lernolibro de regula Esperanto; Paderborna 1989

Vortaro Hispana-Esperanta (ms.)

Tradukoj:

Soldevila, Du komedioj; Sabadell 1975

Zorrilla, Don Juan 'Tenorio; Ascoli Piceno 1981

Perez Galdós, Doña Perfekta (romano / ms.)

Mallonge...

● Air Canada devis pagi 8.500 € al du Franc-lingvaj Kanadanoj, ĉar dum flugo al Usono la kompanio servis ekskluzive en la Angla. Kanada leĝo ordonas servojn en ambaŭ lingvoj.

● La popolaltlernejo de Berlin-Lichtenberg anoncis en 2011 po unu kurson por komencantoj kaj progresintoj dum la somero kaj dum la vintro, do 4 kursojn.

● Rudolf Fischer refoje ricevis (pagitan) instru-komision por Esperanto dum la venonta vintra semestro en la universitato de Münster.

● Dum la lokaj balotoj en la regiono de Berlino la Pirata Partio (Piratenpartei) aperigis en la reto siajn politikajn strategion kaj programon ankaŭ en Esperanto.

● Florian Filser (ne-Esperantisto) el Germanujo donacis al sia novedzino

ringon kun la Esperanto-enskribo: „Anja, mia amo, mia vivo, mia edzino.“ Germana Esperanto-Asocio liveris la tradukon.

● Baden-Virtembergo estis iam la unua federacia lando, kiu enkondukis la Anglan en la unuajn lernejajn klasojn. Intertempe oni pentas tion. La kulturministerio anoncis retiron de la Angla, ĉar ekspertoj pledis por pli da Germana kaj pli da matematiko. **(voko)**

La Hispana kongreso malfermiĝis por la reta mondo

La ĉefajn okazaĵojn de la Hispana E-Kongreso eblis partopreni ne nur ĉeeste, sed ankaŭ per la reto. Interalie estis rekte elsendita debato inter Jorge Camacho kaj Renato Corsetti pri la temo „lingvo kaj movado“, kaj la spektantoj povis partopreni la diskuton pere de reta babilejo kaj sociaj retoj kiel Twitter. La iniciato estis parte inspirita de freŝa diskuto pri la estonteco de la Universalaj Kongresoj, okazinta en retlisto de UEA, rakontis Toño del Barrio. Laŭ li, la eblo rete partopreni neniel malutilas al la surloka sukceso de kongresoj, prefere male: „Reta elsendo ebligis partoprenon al homoj fizike malproksimaj, sed ĉefe ĝi instigu emon al fizika ĉeesto en estontaj kongresoj.“

(www.liberafolio.org)

Nova terminaro pri Ekoturismo

Akademio de Esperanto liveris raporton pri „Vortareto pri Ekoturismo“ pro la peto de Petr Chrdle (KAVA-PECH) kontroli la lingvaĵon en libromanuskripto kun la titolo „Ekoturisma vortareto: Esperanta ĉeĥa germana angla franca“ verkita de Zdeněk Pluhař, Manfred Westermayer, Christopher Fettes kaj Raymond Skilling. Ĝi enhavas 592 terminojn en Esperanto kun tradukoj en la 4 aliajn lingvojn. (www.akademio-de-esperanto.org/verkoj/faka_lingvo_raporto20110415.pdf)

La septembra „longa nokto de la lingvoj“ en Vieno

Okaze de tiu aranĝo de diversaj kulturaj instancoj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko proponas senkoston gvidadon tra la muzeo kaj mallongajn t.n. fulm-kursojn. Popolaj altlernejoj prezentas informojn pri diversaj lingvoj, same la centra urba

biblioteko; eĉ „Sprachen-Bim“ (lingvotramo) veturas tra Vieno kaj interesitoj povas senpage kunveturi kaj konatiĝi kun diversaj lingvoj.

(www.onb.ac.at)

La 100-a bildo ĉe bildetejo.net

Dum la lastaj monatoj aperis jam 47 bildstrioj kaj 53 humurbildoj ĉe bildetejo.net. Tio signifas, ke nun sume 100 Esperantaj bildoj videblas. Sed ne nur „videblas“, ankaŭ ili haveblas laŭ permesilo de Krea Komunaĵo. La lanĉanto de tiu humor-retejo anoncas, ke pli da bildoj sekvos ĉi tiujn unuajn 100.

(www.bildetejo.net/)

Blogo „Mojose“ kun nova adreso

Jen blogo pri ideoj kaj produktoj en la krucvojo inter arto, fasonado, kulturo kaj teknologio. Publikigita ekde Junio 2008 kiel persona katalogo kaj referenca ilo, ĝi celas atingi kelkajn milojn da legantoj el ĉiuj partoj de la mondo pere de Esperanto. „Mojose“ nun havas novan adreson: www.facebook.com/esperantomojose

UEA ricevis tri novajn Honorajn Membrojn

En sia kunsido en Kopenhago la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA) elektis tri elstarajn movadanojn Honoraj Membroj de UEA. Ili estas d-ro Detlev Blanke el Germanio, d-ro Renato Corsetti el Italio kaj s-ro Rob Moerbeek el Nederlando.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Artikolo pri Esperanto en la faggazeto „Kriminalpolizei“

En la Aŭstria faggazeto de kriminala polico (4-5/2011) aperis dupaĝa raporto pri Esperanto kaj polico. Traktata estas la historio, la celo kaj la nuna situacio de la Internacia Lingvo, ankaŭ legeblas pri la devizo „Servo per amikeco“ en la IPA-insigno. („aŭstraj esperantistoj“)

EU-dokumento kun mencioj pri Esperanto

En Bruselo, ĉe la Eŭropa Unio (EU), en julio 2011 aperis grava raportdokumento pri multlingveco ene de la EU. Danke al la tre aktiva kunlaboro de pluraj esperantistaj lingvistoj kaj fakuloj sub la gvido de Seán Ó Riain, Esperanto kaj ties pozitiva rolo en la lernado de aliaj lingvoj ricevis lingvopolitike gravan agnoskon ĉe la EU. La rekomenddokumento „Politikaj Rekomendoj por la Antaŭenigo de Multlingveco en la Eŭropa Unio“ estas detala raporto (140 paĝoj), kiun kune verkis 29 tut-eŭropaj organizaĵoj kaj kiu plurloke parolas pozitive pri ebla rolo por Esperanto por antaŭenigi multlingvecon. La raporto ĝenerale substrekas la egalrajtecon de lingvaj komunumoj, grandaj aŭ malgrandaj, kaj konsideras ke la dominado de iu ajn nacia lingvo, kiel la angla, havas negativajn sekvojn por aliaj lingvoj kaj ties parolantoj. La reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en la forumo estis Seán Ó Riain, Jozef Reinvar kaj Maja Tišljarić.

(www.edukado.net)

ILEI-konferenco 2011

„Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado“ estis la temo de la 44-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la Universitato de Kopenhago. Al la konferenco kaj simpozio aliĝis pli ol 90 personoj (i.a. el Brazilo, Meksikio, Kubo, Benino, Ganao, Indonezio, Nepalo, Japanio, Korea Respubliko kaj Ĉinio), temis pri la plej granda konferenco de la lastaj 20 jaroj.

(Stefan MacGill)

Novaj gastejoj en la Esperanto-urbo Herzberg

Esperantisto el Vieno, Seyed Abolhassan Mir Javadi (voknomo AMIR), iama posedanto de Esperanto-Paradizo, aĉetis la malnovan hotelon

Goldener Hirsch kaj translokiĝis al Herzberg (Esperanto-Paradizo (1992-2006) estis vendejo kaj bufedejo en la riverbanejo Kritzendorf apud Danubo). Li komencis renovigadi la konstruaĵon. En la Herzberga ĉefstrato estis malfermita Esperanto-kafejo en la korto de la domo de lokaj entreprenistoj gesinjoroj Schicke. Ili uzas menukarton kaj varbŝildon sur la dommuro en Esperanto.

(www.esperanto-urbo.de)

Esperanto je la tria loko en Tatoeba

Esperanto, post la angla kaj japana lingvoj, ekde septembro 2010 staras sur la tria loko en tiu japana retejo, kiu disponigas frazaron por kompreni vortojn en natura ĉirkaŭaĵo kaj enhavas 1.000.000 frazojn, el kiuj 94.107 estas en Esperanto.

(Laŭ Lu Wunsch-Rolshoven)

(www.tatoeba.org)

Tutamerika Kongreso de Esperanto

Kune kun Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) okazis la 1-a internacia Esperanta Kinofestivalo, baptita „Kino sen Limoj“ kaj ankaŭ la Brazila Kongreso de Esperanto kaj Brazila Esperantista Junulara Kongreso. KER-ekzamenoj sesio sukcese okazis en Brazilo dum TAKE. Brazilanoj amase partoprenis en ekzamenoj kaj sekve Brazilo fariĝis la lando kun la plej multaj ekzamenitoj en la mondo.

(Diversaj fontoj, i.a.: www.liberafolio.org/2011/unua-esperanta-kinofestivalo-ravis-spektantojn-sed-rezultis-en-suldo)

Nova estraro de TEJO

Dum la Internacia Junulara Kongreso en Kievo la komitato elektis novan estraron de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO): Łukasz Żebrowski (prezidanto), Paulina

Kożuchová (ĝenerala sekretario), Alisa Nikitina (kasisto), Sergeo Tyryn (informado), Nico Huurman (aktivula trejnado), Petra Smidéliusz (landa agado), Michael Boris Mandirola (eksteraj rilatoj) kaj Tina Tišljar (kongresoj).

(www.tejo.org/eo/node/1228)

Sloganoj por la 125-jara jubileo de Esperanto nun ankaŭ esperantlingve

La retpaĝo por kolekti jubileajn sloganojn intertempe ekzistas ne nur en la germana, sed ankaŭ en Esperanto: <http://tricider.com/t/decide/en?show=2poU>. Oni povas facile kaj sen registriĝo voĉdoni pri la sloganoj kaj aldoni proprajn proponojn aŭ argumentojn.

(TEJO-aktuale)

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Olomouc

En julio antaŭ la Universala Kongreso okazis la 77a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Ĉeĥio, kun entute 56 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉeĥio, Bulgario, Finnlando, Italio, Germanio, Hungario, Kroatio, Pollando, Serbio, Aŭstrio, Rusio kaj Japanio). La ĉeftemo estis „Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj“. Detala raporto estas legebla sur la retejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio www.esperanto.cz/eo/akce/kongreso-de-libe-blinduloj-367.html.

Meksikanoj ekelsendas televidprogramon en Esperanto

La Esperanto-movado de Meksikio estigis televidprogramon parolatan en Esperanto. Ties nomo estas Me-Info, mallongigo de Meksika Esperanto-Info. Redaktas kaj prezentas la programon lernantoj de

Esperanto-kursoj de la urbo Aguas Calientes. La elsendoj okazas per interreto, ĉiuvendrede, je la 2:00 (UTC), ĉe la adreso www.telecentral.com.mx/casts/meinformo/programas.html

Nova adresaro de Pasporta Servo aperis

La ĉi-jara adresaro de PS enhavas 1087 gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj. Ĝi estis redaktita de Alexandre Baudry kaj unuafoje prezentita dum la IJK en Kievo kaj la UK en Kopenhago. En 2009, PS fariĝis ankaŭ socia retejo, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. Ĝi ne anstataŭas la presitan libron sed prezentas aldonajn servojn, haveblajn nur per interreto kaj havas 2000 uzantojn. La adresaro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Wikipedio en Esperanto atingis 150 milojn da artikoloj

Wikipedio en Esperanto atingis en aŭgusto lakvanton de 150.000 artikoloj. Per tio ĝi superas ĉiujn nombrojn de Vikipedioj en aliaj planlingvoj kaj ankaŭ kelkajn en naciaj lingvoj kiel la novhebrea kaj la greka.

(http://eo.wikinews.org/wiki/La_Wikipedio_atingis_150_milojn_da_artikoloj)

[La_Wikipedio_atingis_150_milojn_da_artikoloj](http://eo.wikinews.org/wiki/La_Wikipedio_atingis_150_milojn_da_artikoloj)

Somera Esperanto-studado (SES) en Nitra

191 personoj el 28 landoj renkontiĝis en Nitra, okcidenta Slovakio, por la 5-a SES. Tiun aranĝon tradicie organizas Slovaka organizaĵo E@I, kiu ankaŭ prizorgas la plej grandan portalon por senpaga lernado de Esperanto. Raporton vi trovas en la parto „kune“ de tiu ĉi numero de *Esperanto aktuell*.

Kolektis kaj prilaboris
Uwe Stecher

Nia Eŭropo vojaĝe



Seid begrüßt, ihr herzallerliebsten kune-Leser,

Von unserer post-abituralen Europareise! Zum Zeitpunkt des Redaktionsschlusses für diese Ausgabe befinden wir uns nach einer Umrundung der Ostsee in Brüssel, von wo aus es uns weiter gen Westen ziehen wird. Da wir aber nicht verantworten wollen, Euch, liebe Leser, ohne eine kune zu lassen (die übrigens ab dieser Ausgabe der Esperanto aktuell etwas an Umfang gewinnt), haben wir uns ein paar Tage vom Reisealltag freigenommen und dies hier für euch zusammengestellt.

Unter anderem werden wir euch an ein paar besonders interessanten Erlebnissen unserer Reise teilhaben lassen (insbesondere das SES als Ausgangspunkt unserer Reise, unserem wunderbaren Besuch in Tallinn und unserer Begegnung mit Sushi in Hamburg).

Genießt den Herbst und vergesst nicht, ein paar Kastanientiere zu basteln!
Caroline und Miriam
(und Carl i.A., der jetzt so langsam seinen eigenen Abiturstress bekommt...)

SES 2011 – Es gibt noch immer viel zu lernen!

Auch in diesem Jahr lud das Team der Internetseite lernu.net in die Slowakei, speziell die Stadt Nitra, zur "Somera Esperanto-Studado" - dem Sommerlichen Esperantolernen.

Und genau das war auch der Kernpunkt des Programms: täglich 4 Stunden geballtes Esperantolernen (mit Kaffeepause natürlich) auf 5 verschiedenen Niveaus vom völligen Anfänger bis zum Konversationskurs für Menschen, die Esperanto schon fließend und korrekt beherrschen und dazu noch ein Kurs für Menschen, die selbst Esperanto unterrichten wollen („flugiloj de malfacila vento“). Wer in welches Niveau gehört, wurde durch einen Sprachtest ermittelt, den jeder absolvieren konnte oder auch

nicht, es wurde nicht kontrolliert. Aber es ist natürlich besser, zu wissen, wie gut man sich mit Esperanto wirklich auskennt.

Ich persönlich wäre meinem Gefühl nach nämlich in den Kurs auf Niveau 5 gegangen, musste aber nach dem Sprachtest feststellen, dass das Niveau 4 eher meines wäre – und das stimmte! In dieser Woche habe ich viele grammatikalische Schwierigkeiten, bei denen ich mich bisher eher durchgemogelt habe (ich sage nur: Akkusativ ...) unter der geistigen Führung unserer Kursleiterin Petra Smideliusz endlich verstanden. Auch wenn es beim

tatsächlichen Sprechen manchmal noch nicht hundertprozentig klappt, merke ich es jetzt wenigstens ...

Und obwohl es sich ein bisschen wie Schule anfühlte (inklusive kollektivem Albernsein und gegenseitigem Anmalen, wenn die Konzentration dann langsam weg ging ...) waren die Kurse natürlich freiwillig, wodurch man gleich viel mehr Lust hatte als das in der Schule normalerweise der Fall war, und alle interessiert mitgemacht haben (denn wer keine Lust mehr hatte, konnte einfach gehen).

Aber natürlich ist beim SES nicht alles nur Unterricht. Neben mehreren halb- und einer ganztägigen Exkursion in die Umgebung (zum Beispiel eine mehrstündige Wanderung auf und über den wunderschönen Berg Zobor bei Nitra) und zu größeren Städten in der Nähe, gab es ein breitgefächertes Nachmittagsprogramm mit Vorträgen zu verschiedensten Themen von praktischer Psychologie bis zum Eisenbahnwesen Tschechiens sowie Handarbeitsworkshops, Tanzstunden, Minisprachkurse, Schwimmbadbesuche und vieles mehr!

Doch selbst wenn das Programm für einen mal uninteressant war, konnte man eine schöne Zeit haben - auf der Wiese in der Sonne liegend, mit anderen Gitarre spielend und singend, durch die Innenstadt Nitras wandelnd oder schon mal das erste Bier des Tages in der Studentenkeipe auf



dem SES-Gelände trinkend (0,5 l für 1 €!) ... und dabei natürlich auf klassische Esperantotreffenmanier umringt von haufenweise netten, interessanten, aufgeschlossenen Menschen aus aller Welt und in allen Altersklassen.

Wahlweise konnte man natürlich nach dem reichhaltig-leckeren Mittagessen (das ebenso toll war wie Frühstück und Abendbrot, zumindest in der vegetarischen Variante) einfach schlafen gehen, um dann fit für das Abendprogramm zu sein – so gab es etwa verschiedenste Konzerte, z.B. Volksmusik

aus der Slowakei (gespielt von einer riesigen slowakischen Familie, die sich komplett dieser Musikform verschrieben hat), einschlägige Esperantomusikanten wie Julian aus Kuba, Johannes aus Deutschland und die wunderbare Gruppe Perdita Generacio, eine Gruppe sehr schön singender polnischer Mädchen namens „Vento el Montaro“ sowie die countrylastigen Stimmungskanonen „Asorti“ aus Litauen; außerdem gab es die Gelegenheit zum Tanzen in der Disko der Studentenkneipe und jeden Abend Mitternachtskino. Natürlich konnte man

auch einfach die weiteren Biere (oder Weine oder Cocktails oder Wodkas ...) des Tages in geselliger Runde zu sich nehmen oder tun, was auch immer aus dem Abend zu machen war, z.B. gemeinschaftliches Macarenatanzen auf der Wiese ...

Alles in allem war dieses SES ein tolles Treffen, und nicht wie manches andere, wo nur gefeiert oder nur konferiert wird und es nur junge oder nur alte Menschen gibt, sondern wo sich erfahrene Esperantisten und völlige Neueinsteiger treffen und kennenlernen können. Dringend weiterzuempfehlen! (Miriam)

Kion ni rekomendas al vi: Tallinn

La flosaĵo Ökosaar

Se vi volas malstreĉiĝi en tre fabela drinkejo apud la maro, vi iru en Ökosaar ('ekologia insulo'). Ĝi konsistas el flosaĵo, sur kiu staras tabloj, seĝoj kaj benkoj, tute el recikligitaj materialoj. Oni recikligis normalajn domajn rubaĵojn por konstrui la aranĝon sur la insulo. La centro de tiu drinkejo estas malnova ruĝa buso, en kiu oni povas mendi la drinkaĵojn. Ofte ni iris tien por trinki bonegegustan cidron en la sunlumo :-)

Oni konstruis Ökosaar kadre de la programo „Tallinn 2011: eŭropa ĉefurbo de kulturo“. Ekde 1985 tre diversaj eŭropaj urboj havis la eblecon, prezenti sian

kulturan multkolorcon en tiu programo de la Eŭropa Unio. Pro tio Ökosaar estas la komenco de la tiel nomata Kultura Kilometro, kie oni povas viziti artan ekspozicion, oceanografian muzeon aŭ la tremetigan malnovan prizonojn Patarei ...

La tremetiga malnova prizono Paratei

Antaŭ ses jaroj ankoraŭ malliberejo, Paratei nun estas muzeo, ĉar ĝi vidindas! Kiam oni vidas la kondiĉojn, en kiuj la malliberuloj vivis, oni povus pensi, ke la prizono fermiĝis antaŭ multaj jardekoj. Kelkfoje tio memorigis min pri la koncentrejoj de la nazioj, ĉar ekzemple



ankaŭ ekzistis „pendumejo“, kie ĝis 1991 la mortpunitaj homoj estis pendumitaj. La mortpuno estis abolita nur en 1998, kiam Estonio disiĝis de Soveta Unio.

Oni povas iri tra la ĉambroj, kie la malliberuloj dormis aŭ la malgrandaj ĉeloj, kie ili povis esti ekstere, sed ankaŭ la plafono konsistis el kradoj, tiel ke la gardistoj ĉiam povis observi la enŝlositajn homojn. Kaj ĉio tie aspektis aĉa kaj rompita. Ekzemple la operaciejo aspektis kiel el horra filmo.

Hodiaŭ, Paratei ankaŭ estas uzata kiel alternativa koncertejo kun pikdrata drinkejo. Do, ĝi havas sian propran ĉarmon ...

Suŝiiiiiii'!

Oni ne ĉiam devas vojaĝi for por ekkoni ekzotikaĵojn – tion ni malkovris dum nia eŭropvojaĝa vizito en Hamburgo ĉe la esperantisto Dominik Grauert, kiu kompetente montris al ni la arton de suŝi-farado (okcident-stile, kompreneble).

La nomo „suŝio“ venas laŭ unu teorio de la japana vorto por „acida rizo“, kaj rizo kun vinagro, sukero kaj salo ankaŭ estas la baza ingredienco de suŝio. Originale, suŝio ekestis kiel eblo gardi fiŝojn freŝaj uzante acidigitan rizon, kiu pli kaj pli ankaŭ mem estis manĝata. Hodiaŭ la farado de suŝio preskaŭ estas arto kaj scienco, kaj la kuiristoj strebas por aranĝi la suŝi-pecojn tiel bele kiel eblas kaj ĉiam provas trovi novajn formojn. Tial ekzistas multe da variantoj de suŝio, kiuj diversas aspekte kaj ingredience. Precipe en okcidentaj suŝi-restoracioj, suŝio ne devas enhavi fiŝaĵojn, sed ankaŭ legomoj, tofuo aŭ ovaĵo povas esti uzataj kiel ingrediencoj. Kaj ĉar la plimulto de nia vojaĝgrupo estis vegetaranoj, tiu lasta, por ni ankoraŭ nekonata fakto kompreneble ege plaĉis al ni.



La suŝi-varianton, kiun ni lernis fari, nomiĝas „Maki-Sushi“, kaj ĝi estas la plej konata formo de suŝio en la okcidento – ĝi enhavas rizon kun aldonajo (en nia kazo diversaj legomoj kiel kukumo, karoto, printempa cepo, kapsiko kaj fungoj) volvita en folion de sekigitaj kaj rostitaj algoj nomata „nori“, per bambua mateto kiel volvilo. Ni disigis la preparitan suŝi-rizon (por kio multege da receptoj haveblas en Interreto, ekzemple ĉe chefkoch.de) maldike sur la nori-folio krom strio de ĉirkaŭ 2 centimetroj je la fino, metis la legomojn (kiuj estis tranĉitaj en longajn, maldikajn pecojn) sur la rizon kaj poste volvis tre zorge, uzante la bambumateton, por ke la nori-folio ne rompiĝu kaj la suŝi-rulo regule aspektu. Je la fino, oni malsekigas la lastan strion de la nori-folio kaj gluas ĝin al la resto de la rulo. Nun nur tranĉu la rulon en pecojn ĉirkaŭ 1 ĝis 2 centimetrojn dikaj kaj vi havas vian propran suŝion! Manĝu kun sojosaŭco kaj Wasabi (spicega japana kreno).

Certe la profesia farado de suŝio estas multe pli kompleksa kaj delikata afero, sed ankaŭ provi fari suŝion mem estas tre amuza kaj interesa sperto, kiun ni nur povas rekomendi elprovi mem. Bongustege! **(Miriam)**

La aventurnatura insulo Aegna

Unu horon per pramo for de Tallinn, oni povas sperti belegan naturon kaj postsovetan ĉarmon. Krome la amasoj de kuloj provas elsuĉi ĉiun vizitanton ... En soveta tempo, Aegna estis uzata kiel militbazo, sed nun la naturo denove surkreskas la plej grandan parton de la insulo. Nuntempe ankaŭ loĝas homoj tie en du konstantaj domoj.

La insulo ne vere estas granda. Entute ĝi nur havas 15 km da promenvojtoj de tri malsamaj specoj, ĉiu kun alia aspekto de la insulo. Ekzemple tie troviĝas multaj maloftaj plantoj aŭ oni povas rigardi la tre malnovajn kaj ruinajn militajn konstruaĵojn, kiuj sentigas kiel post

la falo de homaro ... Sed ankaŭ estas iom romantike, ĉu ne?

Aŭ oni povas simple malstreĉiĝi, bani sin en la malvarma maro kaj poste revarmiĝi en la sunlumo.

Oni povas resti sur Aegna nur unu tagon, sed ankaŭ lui dometon aŭ senpage tendumi. Troviĝas du publikaj akvofontoj, sed bedaŭrinde neniu vendejo, nur eta restoracio (kun nur unu vegetara manĝaĵo: terpomaj fritajoj ...). Por la tendumantoj ankaŭ instaliĝis fajrujoj kun kradoj, kie oni povas super fajro kuiri manĝaĵojn kaj poste ludi gitaron kaj kanti aŭ simple rigardi la bonege videblajn stelojn :-)

Caroline Patzelt

Post unu jaro sen la kroata junulara renkontiĝo finfine ĝi denove okazis: MIRO! Sed en tiu ĉi somero 2011 ja eblis partopreni en tiom da diversaj renkontiĝoj, ke la elekto malfacilis: Ĉu iri al IJK, SES, MIRO, FESTO, ...?

Ni tamen senhezite kaj ĝoje aliĝis al MIRO, kiun ni jam konis kaj pri kiu ni gardis bonajn memorojn. Ankaŭ ĉi-jare ni bone elektis kaj pasigis tre agrablan tempon en kasteleto de Stara Sušica. Tie ni ekskursis tra la montaro, kie la arbara ombro kaj la rivera akvo savis nin de la somera varmego. Kelkaj kroatoj fiere montris al ni la novaĵon de tiu ĉi jaro: biero kun limonado! Tiu en Germanio jam konata trinkaĵo nun alvenis al Kroatio kaj ĝojigas la loĝantojn kiuj ĝis nun (aŭ daŭre?) prefere drinkis malmultekostan vinon kun limonado aŭ brandon. Krom mont-ekskursi kaj gustumi vinaĉon el kanistro, ni aldone lernis felti lanon,



dancis kaj kantis popolajn kantojn. La nekroataj esperantistoj malkovris sian talenton por imiti la kroatan lingvon kaj kunkantis ĉiujn kanzonojn, do ĉiuj ege amuziĝis. Kiam ni malsatis, ni ĝuis la plej bonajn manĝaĵojn kaj kukojn preparitajn de la kastelaj kuiristinoj. Feliĉe ni multe

ekskursis, alikaze ni revenintus pli dikaj ol kiam ni alvenis. Finfine ni tre dankas la organizintojn, Ďivo Pulitika i Maja Valentić, pro tiu ĉarmega kaj gaja renkontiĝo! La tempo tro rapide pasis, sed ni esperas revidi vin baldaŭ!

(Sophia Berlin, Xavi Batlle)

Vorstandssitzung in Mömbris

Dass in Mömbris zum ersten Mai-Wochenende die Köpfe rauchen, liegt zum einen am dörflichen Woarscht-Fest und zum anderen am Zusammenkommen des DEJ-Vorstandes. Bis zu vier Mal jährlich treffen sich die Vorstandsmitglieder, um aktuelle Entwicklungen des Vereins zu besprechen und Pläne für die kommenden Monate zu schmieden.



De maldekstre: Clemens Fries, Liesa-Marie Alfier, Helen Geyer, Leo Sakaguchi, Sophia Berlin, Julia Hell

Und wie sieht das dann aus? Auf einer Parkbank unter einem Kirschbaum lässt es sich für Liesa und Julia gleich ganz gemütlich und kreativ arbeiten, während Leo und Sophia die Schirmherrschafts-Anfragen für das JES in Danzig übersetzen, Helen eine Email an alle C-Mitglieder verfasst ... und Clemens sich

Vorteile für die Mitglieder-Betreuung mit sich bringt. Besonders erfreulich ist die neue Internet-Präsenz der DEJ – durch aussagekräftige Fotos und übersichtliche Menüs ist sie wesentlich benutzerfreundlicher gestaltet. Es fehlt nur noch der letzte Schliff, dann wird die DEJ-Homepage für alle zugänglich sein.

Klasikaĵoj de Esperanto: „Karaj papo kaj mamoj“

Jen la unua parto de la klasika letero de germana komencanto al siaj gepatroj.

U nue ĝi estis publikigita en GEJ-gazeto (antaŭa nomo de kune) 5/1982. La aŭtoro estas Thomas Bormann, kiu havis la ideon por tiu teksto, kolektante falsajn amikojn el tekstoj de germanaj komencantoj.

Se vi havas malfacilaĵojn kompreni, nur pensu pri simila germana vorto (kiun oni uzis en la 80aj jaroj :-)). Ĝuu!

(Dankon al Andi Münchow kaj www.krokodilo.de/!)

Karaj papo kaj mamoj!

Salutojn de la Esperanto-trefo en Vest-Berlino! Plelu vin for, ke daŭris la tutan zontagon por fari ĉi tien, ĉar nia auto havis tri panojn. Sed la aŭto vere estas tre alta kaj jam multe rostita. Multaj ŝraŭboj ne plu estas festoj kaj ĉio klapas. Kiam ni rapide peris sur la aŭtobano, ni eĉ perdis du radkapaĵojn. Kaj tio ne estas vico!

Ĉe la vest-osta limo - tio ankoraŭ estas akto: Mi stopis ĉe la endo de la slango kaj devis lunge vanti. Kelkaj raŭproj kaj valcoj riparis la kontrolstelon. Fine ni hontis montri niajn pasojn kaj la aŭtoŝajnon. La mano de la celo stelis al ni dumajn fragojn, ekzemple ĉu ni havas tro filajn cigaredojn. Sed fine ĉio estis en ordo kaj ni faris sub la kolbranĉo tra. Pos-

te ni denove standis lunge ĉe la tankstelo en Ostgermanio (ĉe la sprito ne kostas tiom). Jam estis la seksha hono post mit-tago, do ni estis sufiĉe en ajlo.

Kiam ni alvenis en Vest-Berlino, jam ŝajnis la mondo kaj la stemoj. Ĉiuj aliaj estis en iu pinto kaj levigis unu. Mi ne plu estis en la lago trovi ilin.

Ĉar ni estis sufiĉe hungaraj, ni volis manĝi ion en la universitata menso, sed ĝi ne plu estis ofendita. Do ni manĝis al la harto en fisrestoracio. La vinto portis al mi ŝalon, en ĉi tiu estis alio ĉu bonaj kaj kolo. Mia amiko fragis min: „Ĉu vi volas hosli mian lakson?“ Ĝi jam estis iom alta, sed tamen ĝi gustis gute.

Kilajn salutojn de via xono!



Jen d-ro Mardo en Estonio, la lando, kie ni malplej atendis Esperanton ĉar la estona lingvo tiom strange gas :-D Ĝi apartenas al la finn-ugraj lingvoj kiel la finna kaj la hungara, kio klarigas la strangecon, ĉar ili tute ne rilatas al la germana aŭ aliaj popularaj lingvoj. Cetere, d-ro Mardo ne okupiĝas pri la tagoj sed pri dentoj ... Caroline Patzelt

·kune· estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Julia Hell;

Vicprezidanto: Leo Sakaguchi; Pliaj estraranoj: Clemens Fries, Sophia Berlin, Helen Geyer kaj Liesa Alfier

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

Gemeinsamer Dänisch-Deutsch-Polnischer Esperanto-Kongress

zugleich 89. Deutscher Esperanto-Kongress

Thema: Partner in Europa

Hiermit melde ich mich beim Kongress vom 25. bis 28. Mai 2012 in Berlin an.

(Titel+)Name: _____

Begleiter: _____

Straße: _____

PLZ+Stadt: _____

Tel./Fax: _____

Netzpostadresse: _____

Erlaubnis zur Veröffentlichung:

- im Kongressbuch meine komplette Adresse

nur meinen Namen und Wohnort nichts

- in einer passwortgeschützten Internetseite

nur meinen Namen und Wohnort nichts

Vorauss. Eintreffen: (Datum,Uhrzeit)

Vorauss. Abreise: (Datum, Uhrzeit)

Ich komme mit Auto Zug anders

Ich habe die nebenstehende Summe am

(Datum) _____ auf das Konto:

Deutscher Esperanto-Bund, Sozialbank Mainz

Konto: 860 360 2, BLZ: 550 205 00

IBAN DE05 5502 0500 0008 6036 02

BIC BFSWDE33MNZ

UEA-Konto: geaa-n

überwiesen.

(Nur von deutschen Konten) Nein, bitte die Summe von meinem dem D.E.B. bekannten / unten angegebenen Konto einziehen.

Mein Beitrag zum Kongressprogramm (s.u.)

Ich biete einen Vortrag an (Thema s.u.).

Ich bitte um Unterkunftsangebote für

eine zwei drei Personen in einem Hotel.

eine zwei mehr Personen in einer Pension.

in einer Massenunterkunft.

Meine Zusatzangaben: (Bankkonto, Beitrag,

Vortragsthema, usw.):

Kongressgebühren

Kinder (geb. nach 1996-12-31) zahlen nichts.

In den folgenden Zeilen gilt die Gebühr links für Anmeldungen bis zum 31.12.2011, die mittlere Gebühr für Anm. bis zum 31.3.2012 und die rechts angegebene Gebühr für eine spätere Anmeldung bzw. Zahlung am Ort. Bitte Gebühr ankreuzen oder einkreisen. Alle Angaben in Euro.

bis 31.12.2011 / bis 31.03.2012 / danach

1) Ich wohne in Dänemark oder Deutschland:

und bin kein Mitglied von DEA/DEJO/GEA/GEJ:

80 / 90 / 110

2) Ich wohne in Dänemark oder Deutschland und bin ordentliches Mitglied von DEA / DEJO / D.E.B. / DEJ:

44 / 54 / 74

3) Ich bin **Mäzen** (patrona membro) des D.E.B.:

8 / 18 / 38

4) Ich wohne in Polen und bin kein Mitglied von PEA/PEJ:

40 / 45 / 55

5) Ich wohne in Polen und bin stimmberechtigtes Mitglied von PEA / PEJ:

30 / 35 / 45

6) Ich wohne weder in Dänemark, noch in Polen oder Deutschland:

50 / 60 / 80

Zusätzlich:

Ich nehme einen (!) der folgenden Rabatte in Anspruch:

Ich bin

Jugendlicher (geb. zwischen 01.01.1985 und 31.12.1996)

/ Behinderter mit Ausweis /

Begleiter eines Kongressteilnehmers mit gleicher Adresse

/ bekomme Arbeitslosengeld II

-15 / -15 / 0

Ich spende folgenden Beitrag für die Kongresskasse:

+..... €

Mir kann namentlich im Kongressbuch gedankt werden: ja / nein

Kalendaro

Novembro

11-13: **Semajfinaj Esperanto-kursoj** en pluraj niveloj en Herzberg – La Esperanto-urbo, Germanio, Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983, 🌐 www.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum.de.

26: **35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo** en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, filmoj, prezento de libroj k.a. En la libroservo ĉio rabatita, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, 🌐 www.uea.org; uea@co.uea.org.

Decembro

09-11: **53-a Klerigsesio en Herzberg**, Germanio: literaturo, historio, didaktiko/metodiko, movadajkonoj. Kun Zamenhof-festo, Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983, 🌐 www.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum.de.

09-11: **12-aj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj** en Bjalistoko, Pollando. Prezentoj, prelegoj, arta kaj turisma programo, Bjalistoka E-Societo, PL-15-282 Białystok, ul. Piękna 3, Pollando, 🌐 esperanto.bialystok@interia.pl.

10: **Antaŭkristnaska renkontiĝo** en Písek, Ĉeĥio. 🌐 pisek@esperanto.cz.

11: **Zamenhoffesto** en Oostende, Flandrio, Belgio, kun malvarma tagmanĝo, tombolo, kantado, kvizo ekde la 11:30 horo. Marc Cuffez, Esperantogrupo La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgio. 🌐 <http://verenigingen.nieuwsblad.be/vereniging/esperantogroep-lakonko>; flandrio@hotmail.be.

12-18: **Zamenhofaj Tagoj 2011**, kun Internacia Pedagogia Kurso en Bydgoszcz kaj Toruń, Pollando, Internacia Klubo „Esperantotur“, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎ (+4852) 346-1151. 🌐 www.esperanto.bydgoszcz.eu; esperanto-turismo@wp.pl aŭ info@esperanto.bydgoszcz.eu.

27 dec-01 jan: **Junulara Esperanto-Semajno 2011** en Gdansk, Pollando, neforgesebla etoso, neordinaraj temo kaj homoj, nestreĉa programo, nemalbela loko, nekutimaj ideoj, simple... neellasebla semajno de mojosa ludo! 🌐 jes@pej.pl.

27 dec-02 jan: **Alternativa jarfina programo** de Interkultura Centro Herzberg SANO-2 post la sukcesa unua tia vintra renkontiĝo en la lasta jaro: ekskursoj, migrado, sportoj,



© mil, <http://mycartoons.de/>

Tradukado de <http://bildetecio.net>

jogo, naĝado, saŭnumado, manlaborado, lingvoekzercado, muziko, distraj programeroj, Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983, 🌐 www.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum.de.

27 dec-03 jan: **28-a IF – Internacia Festivalo** en Xanten (inter Duisburg kaj la nederlanda landlimo), kadra temo: Benelukso. Tuttaga ekskurso al Nijmegen, Nederlando, Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio, ☎ +49-5624-8007, 📞 +49-171-4964558, 🌐 www.internacia-festivalo.de; HDP@internacia-festivalo.de.

27 dec-03 jan: **10-a Novjara Renkontiĝo (NR)** en Bitburg, Germanio. Por infanoj, familioj kaj plenkreskuloj, ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj, prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konversacio, EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. 🌐 www.esperantoland.org/nr/ EsperantoLand; lu.esperantoland@gmx.de.

27 dec-03 jan: **3-a Novjara Internacia Semajno (NIS)** en Bitburg, Germanio, por junuloj kaj junaj plenkreskuloj, apud Belgio kaj Francio, junularaj programeroj, diskoteko, ekskursoj, lingvokursoj, paralele al la 10-a NR, EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio, 🌐 Lu.Wunsch-Rolshoven.lu.esperantoland@gmx.de